Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 10an de marto 2011, per Skype.

(Aprobita la 14an de aprilo 2011.)

Partoprenis:

Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim
Ulf Lunde en Os
Anne Karin Bondhus en Bryne de punkto 2
Asbjørn Lindh en Oslo
Eli Eriksen Fitjar en Bergen
Arne Olav Mjøen en Tromdheim
Ingebjørg Rambjør en Bergen

0. Tagordo

Aprobita.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 17an de februaro 2011

La protokolo estis aprobita.

2. Ekonomio

La kasisto raportis pri la ekonomio, kaj nun estas tiel:
Skagen Høyrente: kr 58.808
Skagen Vekst: kr 38.129

La estraro diskutis ankaŭ iomete pri du bankkontoj kiuj apartenas al la nun malfondita Eldonejo. Estos pli praktike ĉesigi la DnB NOR-konton kaj transigi la monon al la konto de NEL. A.K. Bondhus kantaktos Harald Rygg, kiu respondecas pri la Eldonejaj kontoj, por solvi la taskon.

3. Jarraporto 2010

La estraro pridiskutis la raporton. Ankoraŭ mankas kelkaj punktoj. J.E. Abrahamsen finfaros ĝin.

4. Jarkalkulo 2010

A.K. Bondhus finfaros la kalkulon venontsemajne kaj sendos ĝin rete al la estraranoj por tralegado/komentoj.

5. Tagordo por la landa kunveno

Diskuto pri la proponata tagordo.

6 Eventualaĵoj

Letero de Douglas Draper pri ĉeso de NB-laboro:
La estraro ricevis leteron de Douglas Draper pri la ĉeso de lia laboro ĉe la Nacia Biblioteko. En la letero li skribis pri liaj pensoj koncerne aliron kaj uzon de kopimaŝino. La estraro diskutis la leteron, decidis pluuzi nian kombinan printilon/kopimaŝinon. Se ĝi paneos, ni aĉetos novan. Asbjørn Lindh sendos respondleteron al Douglas Draper.

La venonta estrarkunveno okazos la 14-an de aprilo.

La interkonsiliĝo daŭris inter 19.30 kaj 21.50.

Raportis Ingebjørg Rambjør